# Esperanta klubvespero



prezentisto: Luko
ĵaudo la 2023-10-04

https://lukas-prokop.at/talks/klubvesperoj/

# Kiu mi estas?




*Esperanta nomo:* Luko

- ĉefe mi estas programisto
- en mia libertempo
  - mi praktikas kaj instruas Aikidō
  - mi lernas Esperanton kaj la japanan
  - mi stud(i/a)s informatikon kaj matematikon
  - mi verkas programon por cifereca kompostado

# Kiu mi estas?

- mi eklernis Esperanton je la oktobro 2020
- mi precipe lernis esperanton per duolingo
- 2022 mi uzis Amikumu
- 2022-01 mi renkontis Matthieu
- 2022-02 mi renkontis Rikardo
- mi finis la tutan arbon en majo
- mi kutime aŭskultas la podkaston
  de Johannes kaj Eva: kern.punkto.info
- Nun mi prezentas en Esperanto



# Proponataj temoj

- La Universala Kongreso de Esperanto 2023
- La defensivarto Aikido
- Lingvistikaj aspektoj de la japana lingvo
- Lingvistikaj aspektoj de Esperanto
- La unua libro
- La proponoj de esperantidoj
- La bazo de matematiko
- La bazo de programado
- La paradigmoj de programado
- La programlingvo trankvila
- Mana kompostado
- Cifereca kompostado

# Proponataj temoj

- La Universala Kongreso de Esperanto 2023 (okt)
- La defensivarto Aikido (nov)
- Lingvistikaj aspektoj de la japana lingvo (dec)
- Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (jan)
- La unua libro (feb)
- La proponoj de esperantidoj
- La bazo de matematiko
- La bazo de programado
- La paradigmoj de programado
- La programlingvo trankvila
- Mana kompostado
- Cifereca kompostado

La 108-a Universala Kongreso de Esperanto 2023

# Universala Kongreso de Esperanto 2023

- Ekde la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023
- Politeknika Universitato de Torino, Torino, Italio
- Bulteno por partoprenantoj
- https://uk.esperanto.net/2023/programo
- „Enmigrado kaj kunfluo de homaj valoroj“
- https://lukas-prokop.at/articles/2023-08-10-universala-kongreso




atribuo: OpenStreetMap


Aurora Penne
Kongresejo
studenthejmo
Savonera
Barriera di Lanzo
Pescarito
Sambuy
San Mauro Torinese
Pianezza
Vallette
Madonna di Campagna
Rebaudengo
Barca
Lucento
Alpignano
A55
Barriera di Milano
Sant'Anna
Aurora
Parella
Campidoglio
Sassi
Collegno
Cit Turin
Cascine Vica
Rivoli
Grugliasco
Pozzo Strada
Torino
Madonna del Pilone
Borgo San Paolo
Borgo Po
Reaglie
San Salvario
Tetti Neirotti
SP7
Santa Rita
Mirafiori Nord
Pino Torines
Filadelfia
Rivalta di Torino
Nizza Millefonti
Fornaci
Lingotto
Fiat Mirafiori
Beinasco
Borgo Melano
Mirafiori Sud
Pecetto Torinese
SP183
Pasta
Orbassano
Borgaretto
Tetti Valfrè
Moncalieri
Testona



Officine Grandi Riparazioni
Residenza Universitaria Borsellino
Via Andrea Vochieri
Via Paolo Borsellino
Aule R
Lavori per Aule R
Corso Francesco Ferrucci
Via Monginevro
Via Pier Carlo Boggio
Aule N
Politecnico I3P
Politecnico di Torino
PUNCH Torino S.p.A.
Corso Castelfidardo
Politecnico
Ferrucci
Centrale Termica Teleriscaldamento
Aule P
Residenza Universitaria Carlo Molino
Corso Peschiera
Mediterraneo
Residenza Abito
Town Palace
Galleria del vento
Le Due Forze
Chiesa ADI
ZEBRA
Via Spalato
Via San Paolo
Corso Peschiera
Via Gambasca
Via Polonghera
Via Virle
Vincenzo Vela
O.G.R.
Corso Stati Uniti
Via Francesco Morosini
Via Vincenzo Vela
Via Luigi Colli
Clinica Odontostomatologica San Giorgio
Corso Rodolfo Montevecchio
Liceo scientifico Galileo Ferraris
Quintino Sella
Alter.POLIS
Torino 27
Via Giuseppe Peano
Corso Duca degli Abruzzi
Stati Uniti
Via Giovanni Battista Bricherasio
Via Magenta
Via Antonio Cantore
Corso Giuseppe Govone
Via Manfredo Fanti
Corso Trieste
Piazzale Duca d'Aosta
Piazza Carlo Alberto Dalla Chiesa
Via Legnano
Via Giuseppe Galliano
Galileo Ferraris
Vittorio Emanuele II
Corso Vittorio
Corso Galileo Ferraris

# [Diversaj privataj fotoj de la kongreso]



# La Espero

En la mondo**n** venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

# Deklaro pri la Esperanta litero ŭ

- A. La Akademio de Esperanto konstatas, ke
  - la Esperanta litero ŭ plej ofte aperas en la sonkombinoj "aŭ" kaj "eŭ";
  - eĉ inter spertaj esperantistoj ne regas konsento pri la demando, ĉu la litero ŭ estas permesebla ankaŭ en aliaj pozicioj, kaj se jes, en kiuj pozicioj;
  - la Gramatiko de la Fundamento de Esperanto (en siaj germana kaj rusa versioj) instruas, ke ŭ estas uzata nur post vokaloj;
  - ekzistas provoj anstataŭigi la malmultajn ekzistantajn Esperantajn radikojn, en kiuj ŭ ne estas antaŭata de a aŭ e, per aliaj radikoj aŭ esprimoj, ekzemple "poŭpo" per "pobo" aŭ "ŝipvosto", kaj "ŭato" per "vato".

# Deklaro pri la Esperanta litero ŭ

- B. Detale studinte la problemaron, la Akademio
  - rekomendas, ke, proponante novan Esperantan radikon, oni evitu uzi en ĝi la literon ŭ en alia pozicio ol en la sonkombinoj "aŭ" kaj "eŭ";
  - rekomendas – depende de la situacio – uzi v aŭ u anstataŭ ŭ, kiam oni kreas novan Esperantan radikon surbaze de nacilingva esprimo enhavanta la sonon de ŭ (aŭ similan sonon) ne antaŭatan de a aŭ e;
  - agnoskas, ke la Fundamenta kaj plej kutima nomo por la litero ŭ estas "ŭo";
  - akceptas, ke en elkri-esprimoj kaj sonimitoj la litero ŭ povas aperi en aliaj pozicioj ol en kutimaj Esperantaj radikoj, ekzemple silabkomence aŭ inter konsonanto kaj vokalo (kiel ekzemple en la zamenhofa elkri-esprimo "ŭa" kaj en la sonimito "kŭaks");
  - opinias, ke, indikante la prononcon de fremdaj esprimoj per Esperantaj literoj, oni uzu ŭ por indiki sonon egalan aŭ tre similan al la Esperanta prononco de ŭ sendepende de la pozicio de la sono en la koncerna esprimo, ekzemple Wells [ŭelz] kaj Pwani [pŭani], tamen konsciante, ke tia prononcindiko ne estas esperantigo.



XVIII Dicembre
Corso Palestro
Via Ettore Perrone
Via Ottavio Assarotti
Via Giuseppe Garibaldi
Corso San Maurizio
Lungo Dora Siena
Dora
Corso Tortona
Via Cernaia
Via San Dalmazzo
Via Cernaia
Corso Vinzaglio
Via Vittorio Amedeo Secondo
Via Amedeo Avogadro
Corso Galileo Ferraris
Via Confienza
Via dell'Arsenale
Via Roma
Centro
Via Po
Via Gioachino Rossini
Corso San Maurizio
Via Luigi Tarino
Via Sant'Ottavio
Via degli Artisti
Vanchiglia
Via Michele Buniva
Via Daniele Manin
Via Bettino Ricasoli
Corso Giacomo Matteotti
Via San Quintino
Via Lascaris
Via dell'Arcivescovado
Via Maria Vittoria
Via Giulia di Barolo
Via Eusebio Bava
Lungo Po Niccolò Machiavelli
Po
Via San Quintino
Via Magenta
Via Vincenzo Vela
Via Manfredo Fanti
Via Giovanni Giolitti
Via Santa Croce
Via Principe Amedeo
Via San Quintino
Via Roma
Via Camillo Benso Conte di Cavour
Via San Massimo
Via delle Rosine
Via Maria Vittoria
Corso Casale
Corso Stati Uniti
Re Umberto
Via Magenta
Corso Galileo Ferraris
Borgo Nuovo
Via Giovanni Giolitti
Ponte Vittorio Emanuele Primo
Corso Casale
Via Santorre di Santarosa
Via Lodovica
Via Felice Romani
Via Caterina Segurana
Via Ferrante Aporti
Via Montevecchio
Via Magenta
Via San Secondo
Porta Nuova
Via dei Mille
Via San Francesco da Paola
Via Fratelli Calandra
Via dei Mille
Via della Rocca
Corso Cairoli
Po
Corso Galileo Ferraris
Via Alfonso Lamarmora
Corso Re Umberto
Via Giovanni Camerana
Torino Porta Nuova
Via Goito
Via Bernardino Galliari
Via San Pio Quinto
Corso Cairoli
Corso Moncalieri
Borgo Po
Via Villa della Regina
Via Legnano
San Secondo
Via Claudio Luigi Berthollet
Via Nizza
Via Saluzzo
Via Governolo
Corso Giovanni Lanza
Ponte Umberto

# Venonta kongreso

- 3-a ĝis 10-a de aŭgusto 2024
- ĉe Aruŝo en Tanzanio

# Konkludo

- Mirinda sperto
- Se vi ĉiam aŭskultas la vortoj en Esperanto kaj devas respondi en Esperanto, vi lernas multe da Esperanto („emersio“)
- Mi parolis kun diversaj afablaj homoj

Koran dankon!